

Christian Felix Weiße,

La kontenteco

tradukita de Manfred Retzlaff

Trankvile, milde sentas mi
La vivoĝojn sen ĉagreno.
Senĝene lumas tie ĉi
Bonvenon la mateno.

Kontentas, gajas mia kor',
Ĝi daŭre batas melodie.
Agrabla estas la dolor',
Se ploras mi pasie.

Priridas mi ja ĉiujn ĉi
Heroojn, sangverŝantojn, princojn.
Pri mia dom' kontentas mi,
Bezonas ne provincojn.

Ja furiozas kontraŭ si
La grandsinjoroj kvazaŭ-diaj.
Sed ĉu bezonas ili pli
Da spac' en tomboj siaj?

*Traduko de la Germana poemo "Die Zufriedenheit" de CHRISTIAN FELIX WEISSE (*1726-01-28 - †1804-12-16) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04) en 2014-08.*

Arg-1086-2188 (2014-08-27 13:47:43)

Tiu ĉi poemo estas trovebla ankaŭ en http://www.gedichte-lyrik-poesie.de/Weisse_Die_Zufriedenheit/index.htm.